

# FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE  
77610 FONTENAY TRESIGNY  
FRANCE

# KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★  
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 - PARIS  
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 - LE PERREUX SUR MARNE  
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue de Milngavie 49150 - BAUGE

C.c.p. Association Catholique Française pour l'Espéranto ROUEN 2324 93 N.

==== la n°: 2,50 F; abon°: 8 F; kotizo: 2 F; sume: 10 F. =====  
xx

--- N° 115 --- BULLETIN TRIMESTRIEL --- TRIMONATA BULTENO ---  
\*\*\* Sankta PIO X-a, preĝu por ni. \*\*\*

--- JANUARO 1978 ---  
=====

xx

## BILETO DE LA PREZIDANTO.

Au cours du trimestre précédent a eu lieu à Rome le Synode des Evêques. Là, comme en bien d'autres circonstances, a été ressentie la difficulté des échanges: le latin ne satisfait plus aux exigences d'expression des faits et des idées de notre temps. Langue de base de notre culture occidentale, élément, en notre partie du monde de la formation de l'esprit, il est évident qu'il ne peut plus prétendre à jouer le rôle d'une langue à vocation pratique universelle.

Les congrès internationaux d'Espéranto, les manifestations culturelles telles les "Universités d'été", où sont épargnés les coûteux dispositifs de traduction simultanée et la production de dossiers en multiples langues ont amplement démontré la supériorité de l'emploi de la Langue Internationale.

Où est le progrès: dans la mécanisation des moyens, avec ses contraintes techniques, ses limites et ses pannes, ou dans les rapports humains collectifs et individuels par la parole et sans intermédiaires?

Plus que jamais les peuples, ceux d'Afrique ou d'Asie qui se libèrent petit à petit des séquelles de la colonisation, revendiquent le respect de leur identité et de leur culture: ni le latin, ni l'une des langues nationales à prétention mondiale ne peut répondre à ce besoin.

Au contraire, une langue neutre, apte à exprimer toutes les nuances de la pensée, peut satisfaire aux nécessités actuelles de la communication dans le respect du génie propre à leurs traditions.

Il serait naïf de croire que les autorités en place accepteraient de se convertir; certes, mais c'est l'avenir qui est entre les mains de notre génération: il appartient à l'ensemble des espérantistes de notre temps de se tourner vers les jeunes.

Souhaitons que les efforts conjugués de nos groupements obtiennent que l'enseignement de l'Espéranto acquière un droit de cité dans nos écoles, nos institutions, nos séminaires, nos universités. Les plus petits résultats seront une semence dont nous ne pouvons estimer les fruits.

Un tel effort, partout où nous agissons, sera de nature à étendre à la dimension du monde les possibilités de contact.

Ainsi, parmi les chrétiens, l'emploi de la Langue Internationale deviendra pour tous ceux qui l'auront adoptée un moyen de resserrer leur unité et de manifester efficacement l'universalité du Peuple de Dieu.

René-Claude COLAS.

§ § § § § § §

LINGVA ANGULO

Grandan sukceson atingis la esprimoj proponitaj en FKE n° 114, ĉar venis ok respondoj, nome de: S-roj BOURGOIS (B), DAUCHEZ (Da), DEGRELLE (De), de SALVO (S), FARDET (F), GUILLON (G), LE MARQUAND (L) kaj S-ino MICHAU (M). Gratulon al ĉiuj, pro ilia kuraĝo kaj bonaj proponoj.

1) à tire-larigot: abunde (B,L); multe (B, De, L); nelimige (B); senspire trinki, trinki kiel sonorilisto (ĉar "La Rigot" estis sonorilo) (Da); laŭvole multe (De); senbride (S); tro drinkante dank' al tubo (F); ade (L); ĝissate, elĉerpe (M).

2) y mettre du sien: alporti sian kontribuon, partopreni la komunan penadon, agi laŭpove, diligenti (B); sindoneme agi (Da); meti sian bonvolon al tio (De); engaĝi sin en la aferon, elteni la elspezojn (S); kunlabori laŭ sia forto, iomete cedi (F); montriĝi kooperi (G); mem kunpeni (L); sin memhelpi, bonvole kunagi (M).

3) y mettre le paquet: ludi sian atuton, engaĝi ĉion disponeblan, ĉion riski (B); streĉe klopodi (Da); nenion ŝpari por tio, ĉion elprovi por tio (De); fari sian plejebilon (S); meti ĉion enmeteblan, elspezi kiel eble monon (F); konsenti necesan elspezon (G); ne damaĝi sian penon, nenion damaĝi, fortege agi (L); multon riski, senkalkule financi (M).

4) gâter la sauce: konfuzi, malpacigi (B); parte venenigi (Da); difekti la saŭcon, misfari, mispretigi la saŭcon, misavantaĝi la aferon (De); difekti la aferon, ĝeni (S); senbongustigi ion (F); malfaciligi aferon (G); miskuiiri, fuŝe kuiriri, mislabori, fuŝe labori (L); fuŝe enmiksiĝi (M).

5) prendre les jambes à son cou: peli siajn piedojn (B, De); peli la piedojn en en la manojn (B); plej rapide ekkuri (Da); rapidege forkuri (S, L); preni flugilojn je la piedoj (F); kuri tiel rapide kiel eble (G); per paŝegoj forkuri (L); ekfuĝi (M).

6) se tourner les pouces: turnadi la dikfingrojn, resti kun krucitaj brakoj (B); nenion fari, sin okupi je bagatelaĵoj (Da); daŭre nenion fari (De); esti nenionfare (S); resti nenion faranta, nenian laboron fari (F); montriĝi senfara (G); ĝui senfaradon, ĝui senagadon (L); senutile sin okupi, sencele turnadi fingrojn (M).

7) ne pas s' en faire: ne ĉagreniĝi, esti senzorga, filozofi (B); resti senzorga (Da); ne maltrankviliĝi, ne malsereniĝi (De); ne sin ĝeni (De, S); neniam maltrankviliĝi, ne tro gravigi ion (F); esti tute senzorgema (G); ne esti malkvietema, ne esti galhumora (L); trankvile ĉion konsideri (M).

8) s' embêter à cent sous de l' heure: enuegi (B); ĝispleje enui, nesupereble enui (De); terure enui (S); enui, atendi ĝis la horo pasos (F); gravege enui (G); netolerereble enui, malhelpeble enui (L); trovi la tempon enuique longa (M).

9) écraser de son mépris: aroganta montri malestimon al iu (B); formalestimigi (Da); desupre malestimigi (De); piedpremi per malestimo (S); neniigi pro malestimo (F); malestime konsideri (G); malŝate trakti, superŝuti per malŝato, peziigi sian malestimon (sur iu) (L); superece malestimigi (M).

10) s' embarquer sur une galère: implikiĝi en malbonan aferon (B); sin meti en malfeliĉon (Da); engaĝi sin en malbonan negocon (S); enŝipiĝi kun nefidinda kompanio, partopreni en nefidinda afero (F); implikiĝi je grava misaventuro (G); implikiĝi en aferaĉon, en fiaferon, en veindan aferon (L); enŝoviĝi en galerecan aferon (M).

Jen la unua klasifiko por 1978: 1) S-ro LE MARQUAND (10 poentoj); 2) S-ino MICHAU (9); 3) en egaleco: S-roj DE SALVO kaj FARDET (5); 5) S-ro DEGRELLE (4); 6) en egaleco: S-roj DAUCHEZ kaj GUILLON (3); 8) S-ro BOURGOIS (2).

Bonvolu cerbumi pri la jenaj esprimoj proponitaj de S-ro Bourgois:

1) emboîter le pas; 2) s' effondrer comme un château de cartes; 3) un empêcheur de tourner en rond; 4) enlever le pain de la bouche; 5) un ennemi juré; 6) s' entendre comme larrons en foire; 7) un enfant de la balle; 8) il va en entendre pour ses quatre sous; 9) faire entendre raison; 10) s' entourer de garanties.

VENONTA KOMITATKUNVENO.

Dimanĉon, la 5-an de marto 1978, je la 14.30, 4 bis, rue de la Cerisaie PARIS.

La observantoj daŭre estas bonvenaj!!

\* \* \* \* \*





6. Agado de S-ro Ribot. Nia sekretario legas leterojn pri la informado, kiun S-ro Ribot intencas fari ĉe la seminarioj kaj altaj ekleziaj instancoj por proponi perkorespondan kurson al pastroj, gereligiuloj.

7. La venonta komitatkunveno okazos la 5-an de marto 1978.

Fermo de la kunsido je la 18.30.

=====

KONGRESO DE LA FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO ( FKEA)

\*

TOURS 15/17-an de aprilo 1978

\*

KONGRESEJO: Centre St-Martin 10, rue Losserand 37000 - TOURS

sin. turni al S-ro René LECOCCQ "Les Desrès" VERETZ 37270 - MONTLOUIS-sur-Loire  
p.ĉ.k. 2589 24 V PARIS

ALIGKOTIZOJ: individuo 15 F  
geedza paro 20 F  
infano ĝis 16-jara, blindulo, alilandano, sacerdoto,  
religiul(in)o, KELI-ano SENPAGE

LIMDATO DE ALIĜO: 25-an de marto 1978.

\*

PROVIZORA PROGRAMO

Sabaton 15-an de aprilo:

ek de la 15-a horo: akcepto de la kongresanoj; interkono

16.00: komuna vizito de la urbo

19.00: vespermanĝo

post la vespermanĝo: unua kunveno

Dimanĉon 16-an de aprilo:

8.30: matenmanĝo

9.30: ĝenerala kunveno

12.00: tagmanĝo

14.30: kantekezercado ( kunporti la kantikaron)

16.00: diservo, kuncelebrata de la ĉeestantaj sacerdotoj

17.15: debato (de la malbono al la feliĉo per Kristo)

post la vespermanĝo: dua kunveno

Lundon 17-an de aprilo:

9.30: debato

X X X X  
RESTADPREZOJ

Vespermanĝo: 13 F

tranoktado (kun littukoj) 18 F

matenmanĝo: 4 F

tagmanĝo: 15 F

Bonvolu viajn buŝ- kaj tualet-tukojn kunporti.

La dormoĉambroj devos esti liberaj lundon je la 9.00, sed ni disponos pri la kunvensalonoj.

X X X X

KIEL ATINGI LA KONGRESEJON?

Per vagonaro: elirinte el la stacidomo, iri maldekstren ĝis la strato Bordeaux. Laŭiri ĝin ĝis la av. Grammont. Sur la avenuo, dekstre (rigardante la urbodomon), estas bushaltejo. Uzi la n° 1 aŭ 2, elbusiĝi ĉe la haltejo "Pl. Choiseul", tuj post la transiro de la ponto. Oni povas piediri laŭ la sama vojo (1/2 horon)

Per aŭto: venante de la nordo, iri maldekstren antaŭ ol atingi la ponton. Venante de la sudo, transiri la urbon per la av. Grammont, iri la saman vojon kiel ĉi supre per la buso ĝis la fino de la ponto kaj iri dekstren.

La strato Losserand estas paralela al la kajo P. Bert, kiu komenciĝas dekstre tuj post la granda ŝtona ponto Wilson. Estante sur la kajo P. Bert, oni uzu la duan aŭ trian strateton maldekstre ( des Capucins aŭ de la Chaîne), oni sin trovas sur strato Losserand.

AGRABLAN KONGRESON EN TOURS ! ! !

ESPERANTO KURSOJ

NOYELLES-GODAULT: ĝi malfermiĝis komence de oktobro kaj funkcias vendrede de la 18.15 ĝis la 19.15 en la Kultura kaj Sporta Centro.

Kursgvidanto: Lucien BOURGOIS. Lernantaro: du junulinoj kaj ses geknaboj, kiuj regule ĉeestas. La kursejo estas senpage disponigita de la urba instanco, kiu krome donacis la lernolibrojn. Uzata metodo: la Junulkurso.

LE PARRAUX/Marne: en la lernejo S-ta Jozefo, S-ro SEVIN instruas 20 geknabojn. S-ro DESPINEY gvidas alian kurson unuagradan al du instruistinoj kaj konversacian rondon.

BAUGE: S-ino VINCENT gvidas triagradan kurson, kiun vizitas unu sacerdoto kaj du junulinoj.

-:-:-:-:-

KULTURAJ ARANĜOJ EN GRESILLON EN 1978

PASKO: 8-15/4 - renkonto de infanoj kun siaj geinstruistoj  
Kiel gvidi kurson? praktika pedagogio por kursgvidantoj

SOMERO: unua periodo (3-22/7) - diverstemaj prelegoj, diskutoj  
distraj aktivaĵoj, ekskursoj  
praktikado de la lingvo (kursoj)

dua periodo (23/7-12/8) - kurso por komencantoj  
praktikado  
supera kurso  
manaktivaĵoj, ekskursoj

tria periodo (13/8-2/9) - sama programo kiel en dua periodo

N.B. Ekzamensesioj estos organizitaj, sed la celo de la kursoj ne estas la preparado al tiuj ekzamenoj.

-:-:-:-:-

ALIAJ INFORMOJ

1. 1979 année internationale de l' enfant: résolution de l' ONU. L' UNICEF a été déclarée agence chargée de la direction de l' exécution de cette décision. C' est une initiative conjointe du Bureau Catholique International de l' Enfance et de l' Union Internationale de la Protection de l' Enfance qui est à l' origine de ce projet.

2. La Konferencoj de la Societo de S-ta Vincento agas en 108 landoj kaj en la 5 kontinentoj. La membroj nombras ĉirkaŭ unu miliono da homoj. Ni kredas, ke inter ili estas multaj esperantistoj. Estus interesa kaj pozitiva afero la interŝanĝo de spertoj, kiujn ĉiu el ni travivis dum la disvolviĝo de nia porkaritata agado. Kial ne interkonatiĝi, korespondi, reciproke subteni unu la alian uzante gravan interkomprenilon, kia Esperanto estas?

Luigi Caporali nome de la Esperanta Katolika Centro "Don Longoni" Milano

3. La interesuloj pri la revuo KOLEKTANTO povas ricevi senpagan specimenan numeron ĉe la redakcio 1407 SOFIA, Poŝtkesto 46 BULGARIO.

4. Nova stereofona disko kun 14 Kristnaskaj kantoj de la tuta mondo en Esperanto  
Informpetu: ESPERANTO-MUZILO Poŝtkesto 94 42600 TARNOWSKIE GORY POLLANDO

=====

NEKROLOGO

Nia asocio funebras pro la morto de sia ano Hubert FERREZ en Nice. Malnova esperantisto, li gvidis multajn kursojn, ĉefe per sia skriba kurso, kaj multe aktivis, unue en Strasbourg, poste en Nice, kie li retiriĝis.

Nia kasistino priploras la forpason de sia patro, mortintan fine de novembro.

Ni preĝu por la ripozo de iliaj animoj.

=====

NIA MEMBRARO

Novaj membroj 1978: 1) S-ro PILLEBOUE (Yvelines); 2) S-ro DABEZIES (Paris); 3) F-ino TISSOT (Loire); 4) S-ro BERNE (Loire).

Bonfarantoj 1978: S-ro BESSIERE (I & V)

Dumvivaj membroj: S-ro J.M.GUILLON (Loiret) (41-a DM)

\* \* \* \*

PREGO POR LA MALJUNECO

Sinjoro, ne permesu, ke mi fariĝu unu el la grumbluloj, ĉiam ĝemanta, protesta kaj kalumnianta, malgajiga por si mem, neeltenebla por la aliaj.

Konservu al mi rideton kaj ridon, eĉ se ili malkovras sendentan buŝon.

Konservu al mi la humoron, kiu modestiĝas aĵojn, homojn kaj min mem.

Faru el mi, Sinjoro, sindonan maljunulon, kiu scias apartigi sian havaĵon, sian tempon kaj la florojn de sia ĝardeno kun kiu ne posedas tergrundon.

Ne permesu, ke mi ĝariĝu homo de la pasinteco, kiu ĉiam parolas pri la feliĉa malnova epoko, en kiu ĉio iris glate, kaj veas la epokon de la junularo, kiu fuŝas ĉion.

Faru el mi, Sinjoro, maljunulon, kiu ne forgesas sian junecon kaj rejuniĝas pro la juneco de la aliaj.

Sinjoro, vi starigis la jarsezonojn kaj la vivaĝojn; faru, ke mi estu homo por ĉiuj sezonoj kaj aĝoj.

Mi ne petas de vi feliĉon, sed tutsimple, ke mia postsezono estu bela kaj atestu vian belecon.

Joseph FOLLINET (tradukis AB)

xxxxxxxxxxxx

AFRIKA PSALMO

Suferante mi preĝis la Sinjoron,

Poste li helpis kaj lumigis min.

La Sinjoro estas mia hejmo; mi ne plu timas.

Kion do iu povas fari kontraŭ mi?

La Sinjoro mia vera helpanto estas.

Mi priidris miajn malamikojn; tion mi ŝuldas al lia helpo.

Preferinde estas kaŝiĝi apud la Sinjoro, ol konfidi al homo.

Pli bone estas kaŝiĝi apud la Sinjoro, ol fidi eminentulojn.

La Sinjoro estas mia forto kaj miaj gepatroj; mian vivon Li protektis.

Ĝojkrioj, entuziasmaj bruegoj venas el la domoj de la saĝaj homoj.

El la dekstra brako de la Sinjoro venas timindaĵoj.

La dekstra brako de la Sinjoro estas tiu, kiu estas en la ĉielo.

Mi tute ne mortos; mi vivos, por ke mi rakontu la agojn de la Sinjoro.

Tradukis: Jean Marie GUILLON

xx

LETERKESTO DE RADIO ROMA ESPERANTO (redaktis Antonio de Salvo)

El Baugé, Francujo, bildkarton sendis S-ino J. VINCENT, kiu dankis "pro la regulaj kaj bonaj elsendoj".

"Lastan dimanĉon - diras S-ro A. LEGRET el Vire, Francujo - mi provis kapti vian dissendon. Bedaŭrinde mi ne sukcesis. Mi ree provos, kiam nokto pli rapide venos".

S-ro Marius DESSAPT el Thiers, Francujo, diras: "Profitante kelktagan restadon ĉe miaj gefiloj, en septembro mi ĉeestis kunvenon de la estraro de UFE. Mi parolis pri viaj ĉiusemajnaj elsendoj, kaj petis presigi anoncon en la gazeto por instigi al pli oftaj rilatoj kun via redakcio.

Dum somero, kiam mi loĝis en kampara domo, mi bone kaptis viajn programojn. Tamen, estas bedaŭrinde, ke samtempe okazas via elsendo kaj tiu de Vatikano; ĉu vi antaŭvidas en proksima estonto ordigi la aferon? Mi aŭskultis, ke iu skribis al vi "tio ne gravas, ĉar mi registras per du aparatoj"; jes, bonege... sed ĉu eble por ĉiu?"

LETERKESTO DE NIAJ LEGANTOJ

de S-ro Xavier DAUCHEZ (Epinay/Orge): "Ĉu via strato vere nomiĝas MILNGAVIE? Se jes, klarigu per la bulteno tian strangan nomon!"

R.D.L.R. MILNGAVIE estas urbo de Skotlando ĝemeligita kun Baugé. Simple, ĉu?"

xx

SOLVO DE LA KRUCVORTENIGMO

HORIZONTALA: 1. Agaragar. 2. Kokeriko. 3. Original. 4. Mili; ec. 5. Ole; acid.

6. Do; kleo.

VERTIKALE: 1. Akomod. 2. Gorilo. 3. Akile. 4. Regi. 5. Ari; al. 6. Ginece.

7. Akacio. 8. Rol.

\* \* \* \*



La blankbarba praavo TREBORIX tutkore salutas la samideanojn de " Franca katolika Esperanto Asocio ".




Plezure li akceptis partopreni la ludangulon de ĝia bulteno tre ŝatata de la legantoj.

La ludoj, kiuj, unue estas prezentitaj al vi postulas antaŭklarigon. Des pli bone se la pecoj de tiuj puzloj estus jam tranĉitaj kaj pretaj por la esplorado. Tia bondeziro estas neeble pro kosto de fabrikado kaj plialteco de la poŝtsendo. Vi do, ilin devos fabriki mem, kopiante la desegnojn sur lignon aŭ kartonon... aŭ pli simple, eltranĉante laŭ desegne la folion de la bulteno...

Temen tiun lastan farmanieron vi bedaŭrus, ĉar estus pli agrable por vi ĉu konservi sendifektan la presaĵon, ĉu uzi kiel slipon la paĝon duontranĉitan laŭmeze.

Fina atentigo : la koloro de la pecoj devas esti identa antaŭe kaj dorse, ĉar ili povas esti uzitaj ambaŭflanke.

Bonan serĉesploradon



P1.- Per la kvar similaj pecoj, faru kvadraton.

P2.- Per la kvar pecoj, faru kvadraton.

P3.- Per la kvar pecoj, faru la unuan presliteron de



TREBORIX

RENOVIGO DE LA KOMITATO

En 1978 finos sian mandaton: S-roj BESSIERE, BOURDON, COLAS kaj DESPINEY. Ili estas reelekteblaj. Tamen, novaj kandidatoj daŭre estas bonvenaj. Ĉiu membro pli ol 18-jara rajtas kandidatiĝi kiel komitatano.

Ek de nun, vi povas anonci vin al la ĝenerala sekretario (v. kovrilpaĝon) Aldonu mallongan biografion.

=====

LASTMINUTA INFORMO: Pastro G. SCHNEIDER, paroĥestro en St-Clément 5, rue de Paris St-CLEMENT 89100-SENS, lernas Esperanton kun knabogrupa per Assimil-metodo. Bonvole lu kuraĝigi lin per salutkartoj kaj gazetspecimenoj.

=====

KONGRESA ALIĜILO

sendota al S-ro R. LECOCCQ "Les Desrès" VERETZ 37270-MONTMOURS/Loire

NOMO kaj VOKNOMO:

ADRESO:

Mi aliĝas al la FKEA-kongreso kaj pagas kiel kotizom al S-ro LECOCCQ  
p.ĉ.k. 2589 24 V PARIS la sumon de..... F

Mi uzos la jenajn servojn:

sabaten vespermanĝon (1)	dimanĉan vespermanĝon
tranoktadon sabaton vespere	tranoktadon dimanĉon vespere
dimanĉan matenmanĝon	lundan matenmanĝon
dimanĉan tagmanĝon	lundan tagmanĝon

Mi proponas la jenajn servojn:

legadon dum la diservo ( 1)	monkolektadon
kantadon	prizorgadon de la infanoj

Mi alvenos la ...-an de aprilo je la ....horo per aŭtomobilo/vagonaro

Mi forveturos la ...-an de aprilo je la ....horo

Mi bezonas .... fervoja(j)n rabatilo(j)n.

Bonvolu plenigi unu aliĝilon por ĉiu familiano. Uzu samformatan paperon.

Nepre aliĝu

ANTAŬ LA 25-a DE MARTO 1978.

AMASE VIZITU LA KATOLIKAN KONGRESON

KUNPRENU VIAJN AMIKOJN

ĜIS REVIDO EN TOURS,

LA NEPRE VIZITOTA,

VIZITINDA,

VIZITENDA URBO ! ! ! ! !

+ § + § + § + § +



KOTIZTABELO 1978

IKUE kun "Espero Katolika" . . . . . 35 F  
Peranto: R.Degrelle c.c.p. NANCY 714 95 P.

\*\*\*\*\*

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" . . . . . 10 F  
infanoj ĝis 16-jaraj, sacerdotoj, religiul(in)oj . . . . . 5 F  
Membro bonfaranto . . . . . 50 F  
Dumviva membro . . . . . 200 F

-----

UFE kun "Revue Française" . . . . . 80 F  
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro . . . . . 110 F  
Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2324 93 N.

-----

Abono al "Biblia Revuo" . . . . . 35 F  
Peranto: G.Baudry c.c.p. LILLE 4704 43.

+++++  
Dépôt légal: 1er trimestre 1978    ////// Polycopié par F. M. C.  
Papier de presse n° 34 745        ////// Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brie  
Directeur-gérant: Gaston VERON    ////// 77610 - FONTENAY TRESIGNY FRANCE  
+++++